# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2013


*Kara Leganto, sufiĉe vigle pasis aŭgusta kunveno de nia E-societo, ni ne nur aŭskultis raporton pri la lasta UK de Esperanto en Islando (verkis prezidinto de UkrEA Eŭheno Kovtonjuk), sed ankaŭ ekmemoris pasintajn kongresojn, kiujn ni partoprenis (ekz., jubileaj Kongresoj en Pollando en 1987: junulara en Krakovo kaj "plenkreskula" en Varsovio). Interesa fakto, ke en nia arkivo estas koverto kun salutkarto, eldonitaj speciale al alia UK en Rejkjaviko en 1977 (vd foton). Novulo de nia E-kolektivo Randy (Randio) Ream promesis prelegi septembre pri NASKursaro, meznivelon de kiu trapasis antaŭ nelonge.*




*Nia prezidanto d-ro L. Kordylewski rapostas pri la Memora Diservo dediĉita al forpasinta Gertrude Novak. En ĉi numero ni ankaŭ prezentas la lastan, 6-an tradukon de W. Guthrie-a kantaro preparita kaj affable sendita al nia redakcio. Dankon denove pro ĉiuj raportoj kaj materialoj. Do, eklegu!* –La Redakcio

## Islando per Okuloj de Esperantisto

Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis dum la lasta semajno de Julio en islanda ĉefurbo Rejkjaviko, kunvenigis pli ol mil gesamideanoj el pli ol 60 landoj (tion vi povas legi en diversaj raportoj). Malfermis Kongreson prezidento de Islando, kiu venis… sen korpogardistoj, sen sekurecteamo. Oni ne vidis pafistojn sur la dom-tegmentoj, neniu blokes vojojn por la prezidenta eskorto. Islando estas komunumo de modestaj homoj, kiu komprenas nenion pri korupcio, en hoteloj kaj restoracioj oni ne akcepras te-monon. Krim-situacio en la lando estas nula, ne ekzistaj ŝtelistoj – kien vi povas forkuri de la fora insulo? Telefonnumeroj de la prezidento kaj ĉef-ministro oni povas trovi en telefonlibro.

Islando estas eksterordinara, ekskluziva lando de fajro, glacio, akvo kaj absolute pura aero! Ĝi mem estas tiel pura, ke ekologio preskaŭ ne dependas de registaraj agoj. La lando havas vulkanan originon kaj tie forestas serpentoj kaj insektoj. Kvankam en apuda gronlando insektoj abundas. Islando absolute ne similas al aliaj landoj, ĉar, unue ĝi estis trovita de vikingoj proksimume en IX jarcento, kaj due (kaj denove) pro la vulkana origino tie ĉi okazas tiuj procesojn, kiuj okazis sur la tuta terglobo antaŭ milionoj da jaroj. Mi vizitis vulkanon, erupcio de kiu okazis en Majo de 2010 kaj malhelpis al mi viziti mian foto-ekspozicion en Nov-Jorko. Mirakle, sed apudaj farmlaboristoj survives kaj daŭras "plugi" sian teron. Oni bezonis unu jaron por "ĉirkaŭlavi" la tutan insulon de polvo. Do, eŭropanoj pro la malfacila elbuŝigo (temas pri la islanda lingvo) diras tiel: vulkano E kaj ankoraŭ dekkvin literoj.



En Islando abundas akvofaloj kaj gejseroj, vaporenergion de kiuj oni uzas por plivarmigado de loĝejoj dum malvarma jartempo. En tiu lando oni povas spiri kun la Tero, ne nur per menso, sed per koro oni povas eksenti la planedon. Eble, nur tiu loko povas naski poeton Baldur Ragnarsson, kiun oni kandidatigis pro lia E-poezio por Nobel-premio en literatura branĉo. Jen estas fragmento el lia poemo "La simbolo":

*Trovinte la Simbolon,*
*ekbrilan torĉon, kiu streĉis kolon*
*tra breĉo okuluja,*
*interna suno inter krampoj sangaj,*
*demandis mi; ja kiaj agoj dormas*
*en mia grundo, kvazaŭ semoj strangaj*
*trans prenatingo?*

*Kaj kielaj vortoj*
*senbazajn turojn krabirante formas?*
*Kaj sangaŭroro ĵetis radireton*
*en subkonscian vaston, trans konkreton.*

Iru al Islando por eksenti vian apartenon al Naturo, por forlasi ĉiutagajn klopodojn kaj por pli ofte rideti!

–*E. Kovtonjuk (speciale por Saluton!)*

## Memora Diservo

La Diservo je la memoro de d-rino Gertrude Novak okazis sabate, la 27an de Julio je 11:00 horo en la preĝejo de Our Lady of Mount Carmel en Ĉikago. La preĝejo estis plena de la geamikoj, antaŭaj kunlaborantoj kaj nemultaj familianoj de la forpasintino. Ĉio estis en la angla lingvo. Belaj kantoj kaj muziko akompanis la preĝojn. Unu el la nevinoj ☞

legis la originalan anglalingvan tekston de D-rino Novak, kiun ŝi verkis pri ŝiaj kuracistaj spertoj en Afriko. La dua nevino bele prezentis la vivon de la Doktorino kaj menciis ŝian aktivadon por Esperanto. La solenaĵon ĉeestis la tibeta familio, al kiuj D-rino Novak helpis enmigri kaj vivi en Usono. Bele nacie vestitaj patrino kun du junaj filoj akompanis la pastron ĉe la altaro. Post la diservo la partoprenantoj promenis al la apuda domego, kie laste D-rino Novak vivis kaj kie okazis la akcepto. Krom bongustaj manĝoj, ni ĝuis la kolekton de malnovaj fotoj kaj memoraĵoj, multaj fotoj estis prezentitaj lumbilde sur la larĝa ekran. La familio transdonis al nia E-societo la arkivon de paperaĵoj kiun d-rino Novak kolektis kiel nia Sekretariino, ankaŭ E-librojn kaj flugfoliojn. Espriminte la kondolencojn denomee de nia E-societo, mi havis la eblecon persone danki la fratinon de d-rino Novak. Krom mi kun mia edzino, inter dekoj da partoprenantoj de la evento estis kvar aliaj membroj de nia Societo: Tina, Maria, Marko kaj Charlie kun edzino.

*–Les Kordylewski, Prezidanto*

# Woody Guthrie en Esperanto (6)

La originala kanto estis surbendigita en la jaro 1940 kadre de la ‘Dustbowl ballades’ (baladoj pri la granda sekeco en Usono en la 1930-a periodo). Rimarkinda (laŭ mia opinio) estas la speciala akompanado per buŝharmoniko. *–Preparis kaj Tradukis Klaus Friese, Germanio*

## *Senhejma Laborist’*

*M: I Ain’t Got No Home (Woody Guthrie)*

JSenhejma laborist’ vagadas tra la land’
Kiel malsata korv’ sen nesto sen viand’
Ĉikanas policist’ egalas la afer’
Senhejma estas mi sur tiu granda ter’


Mi laboris sur farmado - senfrukta terapi’
Ĉiam la rikolton al banko portis mi
Malsaniĝis mia edzin’ ŝi mortis en kaban’
Kaj senhejma estas mi en tiu granda land’

Gefratoj miaj tie trotadis sur ĉi strat’
La suno en ĉielo bruladis sen kompat’
Prirabis min riĉul’ forpelis min sen hont’
Senhejma estas mi en tiu granda mond’

Komencis mi labori jam kiel suĉinfan’
Sur kampo kaj en mino ŝvitanta kiel vulkan’
Sed kreskas miaj zorgoj - kia granda tim’
Senhejma estas mi en univers’ sen lim’

Sed simple vidu mem: jes klara la afer’
Ĉie troviĝas ĝoj’, kiel belas tiu sfer’
Malriĉas laborist’ sed riĉas la ludant’
Kaj restas mi senhejma en tiu vasta land’.

# Movadaj Novaĵoj




–La nombro de ŝatantoj de la paĝo de UEA en la socia retejo Facebook (“Vizaĝlibro”) atingis 4000 la 7-an de septembro. La paĝo estis kreita la 5-an de novembro 2009, kaj unu jaron poste ĝi jam havis 1738 ŝatantojn. Poste la kresko malrapidiĝis, sed ĉi-jare la ritmo denove plivigliĝis. Kun 585 ŝatantoj Brazilo daŭre estas sur la unua loko, kun ĉiam pli granda distanco al Usono (366). La seksa distribuo restas praktike sama ekde la komenco: 71,1% de la ŝatantoj estas viroj kaj 27,4% virinoj (la sekso de 1,5% ne estas konata). Per Facebook UEA atingas publikon multe pli junan ol la kotizanta membraro, el kiu pli ol duono aĝas pli ol 60 jarojn. Entute 60,0% de la ŝatantoj en Facebook estas malpli ol 45-jaraj (41,3% aĝas malpli ol 35 jarojn; 18,7% estas 35-44-jaraj). Krome, 17,5% estas en la grupo de 45-54 jaroj kaj 11,9% en tiu de 55-64 jaroj. Pli ol 64-jaraj estas 9,1% de la ŝatantoj. *–UEA*

–Ŝlosilo al la Merk-angla aperis en retejo www.public-domain-materials.com. Ĝi enhavas rimedojn en la angla (ankaŭ en Esperanto) por helpi al lernantoj de la angla. *–M. Jones*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

24an de Septembro – NASK per okuloj de Randy Ream

22an de Oktobro – Davido Kirschbaum rakontos pri artgalerion en Florenco

26an de Novembro – raporta kaj elekta kunsido

15an de Decembro – Zamenhofa bankedo